

Kulturaj Kajeroj

E.MAHE

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 50 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

JANUARO - FEBRUARO

1982 - 1

KULTURAJ KAJEROJ

1982 JANUARO-FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon M. de Waard

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Pri ina vivsorto dum mezepoko kaj renesanco S. Boniol

Tiuj femaloj troigas S. Guillot

La diligenco al Beaucaire A. Daudet trad. A. Ribot

La talento estas senlima S. Nagy

Benata estu la homa memor' kaj la naturo, kiu vivon festas P. Polišĉuk

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

TRIDEKJARA EVOLUO DE GRÉSILLON

En aŭgusto **1952** mi partoprenis la **unuajn** internaciajn semajnojn en Grésillon kaj en julio **1981** mi ĉeestis la **tridekan** internacian periodon. Inter tiuj du tempostacioj okazis larĝa evoluo materia kaj spirita de la beninda kreajo de Henri Micard kaj liaj fidelaj geamikoj.

Okaze de tiu ĉi jubilea trideko, kiu estas samtempe la plej grava periodo de mia persona vivo, valoras fari rerigardon kaj konsideri la evoluon de la kastela vivo kun ĝiaj progresoj kaj malprogresoj aŭ prefere : malprogresetoj.

Kvankam mi ne partoprenis ĉiujn tridek internaciajn periodojn (verdire mi estis en Grésillon nur 15 fojojn), mi tamen havas klaran bildon pri la kresko de ĝia internacia vivo, ĉarma kaj rava pro tiu speciala etoso de libereco, kiu estas ebla verŝajne nur en Francujo kaj kiu — laŭ la gusto de nefrancoj — facile povus konduki al kaosa malordo.

La celo de Henri Micard : krei propran centron de Esperantistoj ĉiunaciaj, kie ili povas vivi inter si kaj instrui unu la alian en tuja harmonio pro la komuna posedo de unu lingvo, estis jam sukcesa kaj atingita en tiu nun tiel malproksima somero de 1952. Post la bedaŭrinde tro frua morto de la fondinto liaj ideoj estis evoluigitaj en plena interkompreno de liaj « heredantoj », kolektiĝintaj ĉirkaŭ la kapabla kerno Pierre Babin, energia gvidanto nun jam dum pli ol dudek jaroj.

Vizitinte la unuan kaj la tridekan internaciajn periodojn mi bone povas konstati la evoluon de Grésillon, ne nur la spiritan evoluon, sed ankaŭ la materian. La unua, la pionira, restado havis sian neforgeseblan ĉarmon de la simpleco, de la manko de multaj komfortaĵoj, tiel normalaj en la ĉiutaga vivo de okcidenteŭropanoj : fluanta akvo estis... sed ne ĉiam, elektra lumo estis... sed ne ĉiam, la manĝoj, tipe franckamparaj, estis bongustaj... sed ne ĉiam, la litoj estis dormeblaj... sed ne ĉiam ! Aliflanke : la internacia harmonia atmosfero, malgraŭ la en tiu unua jaro eta nombro da nefrancoj, estis bone sentebla... jes, ĉiam !

Jam en la unua jaro la iniciatintoj de la Kulturdomo Grésillon komprenis, ke ne sufiĉas fondi hejmon por la somera lernejo, en kiu francoj povas lerni Esperanton aŭ povas pligrandigi sian scion de la internacia lingvo, sed ke necesas ankaŭ ejo por internacia rondo, en kiu freŝdataj gesamideanoj povas utiligi sian novan scion, aŭskultante prelegojn aŭ simplajn lecionojn de alinaciaj Esperantistoj.

En tiu senco mi ricevis la honoran sed pezan taskon funkcii kiel ununura preleganto dum la internaciaj periodoj de 1953 ĝis 1958. En la unua serio de prelegoj mi traktis malfacilajn kaj diskuteblajn erojn de la Esperanta gramatiko, poste sekvis dum pluraj jaroj prelegaro pri la historio de la Esperanta literaturo kaj pri ĝiaj ĉefaj verkistoj. Mi finis per prelegaro kun la komuna titolo « Pledantoj por pli bona mondo », en kiu rolis la vivo de Henri Dunant, Karl Marx, Gandhi k.a.

Montriĝis ke internacia periodo, dum kiu staris senescepte unu sama persono sur la katedro, ne plu estis la plej alloga situacio kaj tial la gvidantoj prave transiris al invito de diversnaciaj prelegantoj aŭ ili disponigis la katedron al tiu, kiu anoncis sin mem aŭ sentis sin mem kapabla. Tiamaniere la internacieco de la periodo trovis pli gravan akcenton, sed perdiĝis (kaj tio laŭ mia persona opinio estas malprogreseto) la unueco de la temo. En 1968 oni provis lastfoje doni komunan temon al la prelegaro (« Homo kaj Maŝino »). Post tiu jaro ne plu estis eble trovi komunan fadenon en la prelegoj. Tio verŝajne estas unu el la kaŭzoj de la ĉiutaga forresto el la prelegejo de ŝanĝiĝanta grupo da grésillonaj gastoj : oni ja ne povas havi intereson por ĉiu anoncita temo.

Estus laŭ mi vera gajno de la internacieco de Grésillon, se oni povus trovi ĉiujare komunan ĉeftemon, pritraktatan el diversaj vidpunktoj de diversnaciaj geprelegantoj. Tio ĉi povos plivigligi la konversaciajn diskutadojn je la 18a horo, ĉar tiuj antaŭvesperaj konversaciaj rondoj, enprogramitaj en la lastaj dek jaroj, fariĝis valora kompletigo de la kultura vivo dum la restado. Ili mankis en la unuaj jaroj.

Interesa por tiuj, kiuj vizitis Grésillon en la unuaj jaroj kaj en la nunaj jaroj de ĝia funkciado, estas la materia evoluo. Nun oni trovas tie ja varman kaj malvarman akvon en ĉiuj ĉambroj, duŝojn en ĉiuj etaĝoj, pli komfortajn litojn kun litotukoj, bone ekipitan kuirejon, afablajn servistinojn kaj — tre grava por la senĝena gvidado de la instruaj kaj kulturaj programeroj — plurajn plaĉajn salonojn en la apudaj dometoj. Nun la konversaciejo kaj la biblioteko vere meritas siajn nomojn.

La kuraĝa kaj riska projekto de la pioniroj radikiĝis en fekunda tero kaj kreskis en tridek jaroj al tio, kion la homoj de 1952 klare vidis antaŭ siaj okuloj : nemankebla regiono de tiu iom utopia lando « Esperantujo » !

M. de WAARD
Nederlando.

Esperanto tra la Mondo

La Esperanto-Movado en Hispanio :

— La 42a hispana kongreso de Esperanto okazos en Malaga de la 16a ĝis la 22a de Julio 1982. Adreso : Poŝtkesto 354 Malaga.

— Ekde La Jaŭdo 19an de Novembro 1981, ene de la programo « La klubo de la Vespero » (Radio Valladolid), estas programero pri Esperanto kiu okazas ĉiujaŭde kun daŭro de dek minutoj.

La poresperanta laboro de niaj aktivuloj :

— Inter la 26a kaj la 28a de Novembro, okazis en Parizo gravaj rekontiĝoj inter reprezentantoj de U.E.A. (D-ro Tonkin, D-ro Peter Zlatnar, mag. T. Sekelj, S-ino Barbara Despiney, S-ro Milojeviĉ) kaj diversaj funkciuloj de U.N.E.S.K.O.. Temis interalie pri la Jaro de la Komunikado, en 1983.

— Seminario pri informado kunigis 22 personojn el 6 landoj en la Centra Oficejo de U.E.A., en Roterdamo, de la 16a ĝis la 18a de Oktobro. Pli ol la duono el ili estis gejunuloj.

La partoprenantoj konkludis ke, nuntempe, kvin kampoj estas prioritataj por la informa laboro : amaskomunikiloj, politikaj kaj soci-politikaj organizaĵoj, instruado-edukado, sciencaj-fakaj asocioj kaj turismo. Informaj iloj estis ankaŭ preparitaj.

— Dum kvar tagoj en Novembro (16a ĝis 21a), trideko da funkciuloj kaj aktivuloj ĉeestis neformalan restadon en Germana D.R. (en Bad Saarow). Estis homoj el dek kvar landoj de orienta kaj okcidenta Eŭropo kaj Usono.

Tri laborgrupoj laboris pri instruado, aplikado de la lingvo, analizado de la disponataj rimedoj. La raportoj formos la bazon de nova provizora laborplano por la jubilea jaro de la movado (1987).

Seminarioj kaj simpozio :

— La tria interlingvistika seminario por G.D.R.-sciencistoj estis organizita de la fakgrupo Interlingvistiko-Esperantologio, kun helpo de Humboldt-Universitato en Berlino, de la 11a ĝis la 15a de Oktobro, en la ĉebaltmara loko Ahrenshoop. La temo estis : « Planlingvo kaj faklingvo ». Partroprenis 30 sc.encistoj el altlernejoj kaj sciencaj institutoj de Germana Demokratia Respubliko.

— La 10a studenta interlingvistika Seminario okazos en Varsovio de la 25a ĝis la 30a de Aprilo. Temo : « Sinkronaj kaj diakronaj aspektoj de la fenomeno Esperanto ».

— Esperantlingvaj fakuloj kunpartoprenis altnivelan simpozion pri komunikado kaj kibernetiko, de la 11a ĝis la 18a de Novembro, en Paderborn (F.R.G.).

En la universitatoj :

— Meze de Oktobro, okazis la tria doktoriĝo pri interlingvistika temo. en la universitato ELTE, en Budapeŝto. Oni scias ke en tiu universitato. Esperanto estas oficiale studata sub la gvidado de la eminenta profesoro D-ro Szerdahelyi.

— Lastan jaron, en la filozifia fakultato de ia universitato J. A. Komensky, en Bratislava (Ĉekoslovakio), studento ricevis diplomon prezentinte tezon sub la titolo : « Komparo de la morfemaj strukturoj de la slovaka kaj Esperanto ».

— Fine de 1982, Nicole Giloteaux, studentino ĉe la universitato Lille III, prezentos magistran disertacion pri la Esperanto-movado en Germanio ĝis 1933.

Esperanto kaj turismo :

En Prago, turista vojaĝoficejo REKREA kaj Ĉeha Esperanto-Asocio interkonsentis, lige kun la favora rezolucio pri Esperanto de la Monda Turisma Konferenco en Manilo, enkonduki Esperanton en turismajn servojn. REKREA organizos interesajn ekskursojn tra la lando kun esperantlingvaj gvidantoj. Interalie, vojaĝo de francaj esperantistoj estas antaŭvidata inter la 28a de Marto kaj la 4a de Aprilo.

Pupteatra festivalo :

Dum lasta Oktobro, estis organizita en Zagrebo (Jugoslavio) la 14a Pupteatra Internacia Festivalo (P.I.F.). Dum kvar tagoj, prezentiĝis en Esperanto 8 profesiaj pupteatraj ensembloj el 6 landoj. Entute, la festivalo ampleksis 35 prezentaĵojn. Ĉijare, oni nombris 110 ensemblojn kaj 157 infanojn, ĉefe el Jugoslavio, sed ankaŭ el Hungario kaj Pollando.

Renkontoj 1982 : oni ankoraŭ anoncas...

— 6a Internacia Junulara Festivalo, en Triesto, de la 9a ĝis la 12a de Aprilo. Informas Itala Esperanto-Junularo, CP 210, I-56100 Pisa.

— Internac a Junulana Esperanto-Renkontiĝo en Nyiregyhaza (Hungario), 4a ĝis 11a de Aprilo. Informas Junulara Komisiono de H.E.A., pf 193, H-1368 Budapest.

— Seminario pri kulturaj kaj praktikaj aspektoj de tutmonda turismo, por francaj kaj germanaj partoprenantoj, en Aix-en-Provence (Francio), de la 7a ĝis la 14a de Julio.

— Internacia renkontiĝo de popolaj orkestroj (kun esperantlingvaj interpretoj), 28a ĝis 31a de Majo, en Torun (Pollando), sub patronado de la etnografia muzeo. Informas Dyr. Roman Tubaja, Mezeum Etnografiozne, Waly Gen. Sikorskiego 19, PL-87-100 Torun, Pollando.

— Semajnfinaj staĝoj prepariĝas en la Kultura Centro Esperantista de La Chaux-de-Fonds (Svisio). Skribi al K.C.E. Poŝtfako 771, Postiers, 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svisujo).

— Restadoj kun kursoj, dum la tuta jaro, en Smoljan (Pisanica) kaj Varna-Oraj Sabloj (Bulgario). Sin turni al Internacia Esperanto-Kursejo, pk 791, 1090 Sofia.

— Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj instruistoj, 15a ĝis 24a de Julio, en Seiano di Vico Equense, proksime de Napolo, Italio. Skribi al Rolando Incoronato Pia, via Panoramica 63, I-80056, Ercolano, Italio.

— Seminario pri Apliko de Esperanto en la Scienco kaj Tekniko (SAEST), en sudbohemia urbo Ceské Budejovice, 13a ĝis 15a de Aŭgusto. Temo : « Energio, la tutmonda problemo ». Informas Ĉeha Esperanto-Asocio, Jilskà 10, CS-11001 Praha I, Ĉekoslovakio.

— Internacia simpozio « La sporto en la moderna socio », 7a ĝis 11a de Julio, en Madrido. Organizas Madrida Esperanto-Liceo, Atcha 98, 4º, Madrid 12, Hispanio.

— Se vi iros al la Monda Futbala Ĉampioneco, Barcelona Esperanto-Centro fondis informoficeion por helpi vin. Adreso : Informoficejo M-82, Carrera Candi 34, Barcelona, 28, hispanio.

— Franca Katolika Kongreso, en Nancy, 10a ĝis 12a de Aprilo ; Respondecas S-ino Paradis, 16, rue Pierre Curie, 54110 Dombasle.

— Internacia Katolika Kongreso (I.K.U.E.), en Lille, 17a ĝis 23a de Julio. Ĉeftemo : « La Paco ». Skribi al L. Bourdon, 7 Avenue Salomon, 59800 Lille (Francio).

PRI INA VIVSORTO DUM MEZEPOKO KAJ RENESANCO

Meze de hereza mondo, kristanismo alportas netakseblan evoluon : ĝi ekproklamas fundamentan egalecon de ĉiuj homoj antaŭ Dio, forigante ian ajn rasan aŭ seksan apartigon. En religio surbaze de amo fundamentita, la privilegiuloj estas la humiluloj, la suferantoj kaj antaŭe subtaksatoj. Filinon oni jam ne plu rajtos mortigi postnaske ; kiam junulino propravole sin dediĉos al monaĥina vivmaniero ŝia decido estos tute alia, ol tia de patro devigante sian filinon al dumviva ĉasteco en templo de Vesta diino. Tia apero de ina personeco kaj memstara volo, jen gravega ŝanĝiĝo. Sed tia mesaĝo nefacile inserteblas en homajn societojn : abrupta aliiĝo de inaj vivkondiĉoj neeblas.

Por manifestiĝi, la dia amo enkarniĝas pere de sanga kaj karna patrineco ; cetere virino apudestas Kriston piede de la kruco. Sed tia ina plivalorigo ne povas efektiviĝi ne kontraŭstarante enradikiĝintajn antaŭjuĝojn. Inter la apostolaro virinoj malĉeestis. En la unuaj palestinanaj komunumoj oni malpermesas inan oficon ĉiaspecan ; tamen baldaŭ evidentiĝos, ke virina apostola agado nepre necesas. Dommastrinoj ofte kaŝaranĝas siadome kristanajn kunvenojn ; de tiuj akceptantinoj oni post mallonge postulos sangateston kaj sangoferon.

Dume sankta Paŭlo, ekslernanto en rabena farisea skolo, rememorigas virinojn pri ilia duaranga situacio kaj disvolvas tri ĉefajn temojn, mezepoke pritraktotajn :

— viro estas peranto inter Dio kaj virino ;
— virino estas duaranga estaĵo por viro naskita ;
— virino kulpis la prapekon.

Por forskui la polvon de la malnova hebrea heredaĵo necesis alispecaj kulturaj enportoj : ili fontis el la grekaj kaj orientaj eklezioj.

PRI VIDVINOJ KAJ DIAKONINOJ

De la komunumo subtenataj, kiam ili ne povis sin vivteni memstare, vidvinoj estis devigataj repage sin dediĉi al preĝado ; ili fariĝis kvazaŭ diaj altaroj. Bonfartaj sesdekjarulinoj unuedzaj estis komisiitaj instrui virinojn pri religio, viziti la malsanulojn kaj malriĉulojn. Ili rajtis surmeti la manojn, sanktolei. La ora epoko de vidvina agado estas la tria jarcento postkrista.

En Romio la diakoninoj (origine edzinoj) apartenis al tute malsupera rango. En Grekio kaj Mezoriento same, kiel viroj agadis ĉe viroj, virinoj agadis ĉe virinoj. Ili konsistis el iaspecaj gastigantinoj ĉe kunveneja pordo ; pli kaj pli ili transprenis la aktivaĵojn antaŭe plenumitajn de la vidvinoj ; ĉi-lastaj siavice fariĝis preĝantinoj, eĉ preĝistinoj. La diakoninoj helpis la pastraron por disdoni la sakramentojn ĉe inoj kaj infanoj. Tiu eklezia ofico estis sankciita de kvazaŭ konsekrado.

Notinda estas la sinteno de la koncilio en Orange kunveninta dum la jaro 441-a : disvastiĝanta kristanaro postulas bonfaradan strukturigon, kiun de nun viroj prenas sur sin.

ABATINO, SOLVIRINO, GEEDZECA TAKSADO

Depost la XIII-a jarcento en orientaj eklezioj oni ne plu ordinis diakoninojn. En okcidento ekde la unuaj jarcentoj laŭ regularo de sankta Cézaire prilaborita fondiĝas kaj disvolviĝas la unuaj pramonaĥinejoj : silentado, preĝado en difinitaj horoj tagaj kaj noktaj, silenta legado (jen tute nova kutimo), sed jam ne vera enklostrigado ; malsanula prizorgado ; ambaŭseksa infaninstruado (komence pere de ĥorkanto, el kies tekstoj la lernantoj iom post iom eltiris la literojn, vortojn kaj legokapablon : jen praa eltutaĵa legmetodo).

Virgecon oni pli kaj pli alte taksas, ankaŭ pro revigliĝo de platonisma filozofio, apero de gnostikismo kaj ties malŝato al amorado.

Kutime kultan rolon inoj ne prenis sur sin, krom kelkaj abatinoj, kiuj arogis al si amplekse-gajn povojn : foje ili regis super ĝemeligitaj abatejoj, eĉ konfesprenis kaj lokis sin sur la saman ŝtupon, kiel la ekleziaj potenculoj.

Estiĝas emo rangaltigi solvirinon, kies digno ne fontas el vira helpo kaj protektado.

Signifoplena estas la evolulinio koncerne la kontraŭadultan reglamentadon : en la komenco adulta edzino meritas mortpunon kaj ŝia edzo rajtas agi laŭplace ; poste la ideo pri mortpuno malaperas : la kulpintino ĝismorte pluvivos en monaĥinejo, sed ŝia edzo povas ŝin ree akcepti dum la unuaj du jaroj postkulpaj. Cetere unuafoje vira adulto estas sankciita per monpuno.

DUM LA FRANKA EPOKO, RETROPAŜO

Estas ja konate, ke virino fariĝas konstanta viktimo en konfuzitaj periodoj, kie regas agitado kaj perfortoj. Ekzemple, Karlo la Granda havis kvin edzinojn kaj multajn kromedzinojn. Oni destinis junajn knabinojn por la reĝa lito. En manlaborejoj, kie ŝpinis kaj teksis junulinoj la nobeloj venis elekti sian « ĉasaĵon ». Ne nur fakte sed ankaŭ jure oni retroiras : tribaj strukturoj de la novalvenintoj enkondukas patriarkecon drastan, kompareblan kun tiu de la Romianoj elpensita. Poste la envenintoj estas influataj de kristanismo kaj de latinaj kutimoj. El tio rezultas, ke virino estas dumviva neplenaĝulino, kiu transiras de la patra al la edza aŭtoritato : la patro transdonas sian povon al la bofilo pere de monsumo tiel, ke ino estas ne kontraktantino sed kontraktobjekto.

Neeblas ĉi-kadre detale pristudi la konfuzitan periodon inter la V-a kaj la X-a jarcentoj. Kiel en ĉiuj historiaj kaj homaj fenomenoj notinda estas evolulinio nerekta, sed zigzaga. Resume oni observas iom-post-ioman plilarĝiĝon de la ina statuto :

— ebleco edziniĝi propravole,

— ebleco ricevi propramane la ĉi-koncernan monsumon, kiun antaŭe la estonta edzo rekte enmanigis al la patro,

— ebleco zorgi pri sia persona havaĵo ;

— ebleco fariĝi heredantino.

Cetere virinoj estis pli tralasivaj ol viroj al kristanisma influo. En Francio, Germanio, Italio, Hispanio, Suomio famaj abatinoj, samrange kiel episkopoj, grafoj aŭ reĝaj vasaloj partoprenis en lokaj kunsidoj pere de siaj rajtigitoj, kiuj diskonigis la volon de siaj sendintinoj. Tamen en la jaro 585-a -laŭlegende-, okaze de koncilio en urbo Mâcon iu malklera episkopo starigis jenan demandon : « Ĉu la termino « homo » taŭgas ankaŭ por virino ? ».


DEKA KAJ DEKUNUA JARCENTOJ : LA FERA AĜO

La ununura firmeco konsistas el ligo inter vasalo kaj feŭdomastro. La feŭdosistemo starigas du kompletiĝantajn organizojn :

— unuflanke militistan defendsocion,

— aliflanke proviantan kamparsocion.

Konsekvence de tio du inaj vivsortoj siluetiĝas : ĉu edzino grandsinjora, ĉu edzino kamplaborista. Same kiel sub Mérovingiens dinastio la tasko daŭre konsistas el terkultivado kaj



truddeviga ŝtofliverado al la nobeloj : nur laŭkvante varias la ŝpinota kaj teksota tolmezuro. Al servutulino trudiĝas duobla laboro (servutulo estas herede submetata al sia feŭdomastro. Eĉ kiam gefiloj estis naskitaj de gepatroj, kies feŭdomastro ne estis la sama, oni dividis la servutulan naskitaron).

En fermita universo vivas edzino nobela : meze de sia servistinaro ŝi ŝpinadas, brodadas, kudradas ; en okazo de bezono flegas la vunditojn. Ŝi estas nur nepreciza figuro meze de societo vira ; nur preterkure profiliĝas fianĉinoj aŭ edzinoj en ĝestoj ; nur heroinoj ili aspektas, kiuj reblovas la fajron de kuraĝo aŭ trapikas la gorĝon kaj duonigas la kranion de sovaĝa atakanto. Sed kavaliroj nur malestimas erotikaĵojn.

Tamen pro longa forestado de la edzo forveturinta al krucmilito, ŝi akiras paŝon post paŝo pligrandiĝantan lokon, kaj sur fakta kampo, kaj sur jura kampo : ŝi devige regas super la bieno : eĉ kelkaj estis memposedantinoj de feŭdobienoj : tiaj estis ekzemple grafino Mahaut d'Artois, Hermengarde de Narbonne, Aliénor d'Aquitaine, eksedzino de Ludoviko la sepa. Tamen en la jaro 1316-a post la morto de Ludivoko la deka oni rifuzis surtronigi virinon pro tio, ke reĝiniĝo implicus konsekradon, t.e. speco de ordinado.

Ofte okazis, ke nobelulino fariĝis poredziĝa kalkulobjekto cele al transdono aŭ transpreno de feŭdobieno. Por malhelpi tiajn troigojn la filo de Vilhelmo la Konkerinto sin devigis ne perforte edzinigi orfinojn aŭ vidvinojn.

TEKSOKANTOJ

En kampardometoj kaj kastellaborejoj inoj teksadas kaj ŝpinadas laŭritme de siaj kantoj : ili estas verkoj de kaj por ŝpinistinoj. Ili konsistas el sennomaj popolkantoj, en kiuj oni prikantas amon, fidelecon, forlason, esperojn. Inoj gardas civiliziacion per poezio, sopiro al amo vera, al valoroj esencaj.

DUA FEŬDEPOKO : XII-a KAJ XIII-a JARCENTOJ, LA ORA AĜO

La eklezio mildigas la morojn kaj provas malrapidigi la militan sinsekvon kaj la internobelajn luktojn : tiucele ĝi komisias la kavaliraron protekti vidvinojn kaj orfojn ; paca erao komenciĝas. Krucmilitoj maloftiĝas. El Oriento oni enlasas emon al festoj, lukso, pompo. Laŭ galanta ammaniero kavaliro enpaŝas la batalejon nur por plaĉi al sia damo. La ĉefa afero fariĝas konkeri daman koron, amsopiri je la piedoj de belulino. La vorto « omaĝo », t.e. subiĝo de viro al viro, aliiĝas al subiĝo de viro al virino. Feŭdeco enscenigas literaturan fikcion : kavaliro, ĉu grandsinjoro, ĉu humila trobadoro estas servisto de sia damo. Kruda, nedaŭra amo cedas la lokon al korbatiga sento. Ina korpo estas perceptata, kiel videbla juvelujo entenanta nevideblajn valorajojn. Spiritaj vojoj trairas la ĝojon ami. Ina povo jam ne konsistas el estigo de deziro sed el stimulilo de plej noblaj animfortoj : vera amanto kapablas plenumi ĉiaspecajn provajojn kaj el propra doloro li ĉerpas superan ĝuadon.

Oni tre malofte elparolas la nomon de la mistera elektitino ; ofte temas pri aŭtentaj belkorpaj vivulinoj, foje jam edziniĝintaj ; sed malproksima amo sufiĉas por nutrofortigi la poetan sentimenton. Ofte trobadoroj amas platone : tia estis Catelan, kiu sekvis Marguerite el Provenco Parizen kiam ŝi edziniĝis je Ludoviko la naŭa (sankta Ludoviko). Oni murdis lin en Bulonja arbareto kaj la murda loko alprenis lian nomon.

En amliteraturo enŝteliĝas distingo inter amo kaj geedzeco. La romano pri Tristan kaj Yseut estas eŭropa mito pri adulta pravigo. La erare englutita amtrinkaĵo prezentas simbolan ekskuzon por amo liberiĝinta el geedzeca ligo. Ĉe Marie de Champagne oni starigis jenan demandon : ĉu vera amo povas estiĝi inter geedzoj ? Nee respondis Maria. En Sudfrancio notindas la kutimo, ke ofte geamantoj travivas la unuan nokton kunan neamorante. Verdire sinteno tia plejparte fontis el truditaj geedziĝoj. Sed ĉu platona, ĉu adulta, la amo al la elektitino postulas fidelecon kaj ekskluzivas vulgarecon. Amkodo estas starigita, kiu definitive stampas nian okcidentan civilizacion. Ina kulto : jen la transcenda vojo al la spirita aventuro. Ina kulto enpenetras kristanan piemon al Nia Sinjorino, al kiu oni dediĉas multnombrajn katedralojn. Ni aldonu signifoplenan detalon : en ŝakludo la damo anstataŭas la ministron, kiel reĝan adjunkton ; kaj poste la damo fariĝos reĝino.

Por pli bone klarigi la « amdemandon » tiustilan, ni aldonu du rimarkojn : unue amkortumoj ĉe inoj respondis virajn kortumojn, kie vasaloj omaĝis al feŭdomastro kaj kie oni eldiris juĝojn. Amanto estis de la damo juĝata kaj omaĝis al ŝi. Due : dum la katarisma epoko, kiam trobadoroj plej brile prosperadis, iliaj kantoj ofte akceptis du signifojn : la unua povis esti de la plimulto komprenata dum la dua, simbola, esotera, liveris kaŝitan mesaĝon pere de religiaj kaj poeziaj ŝlosiloj al la adeptoj devigataj sin kaŝi pro la romkatolika inkvizicio. Ekzemple, la ofte uzata antaŭnomo Johanino prezentas la katarisman eklezion, kies plej alte taksata protektanto estis sankta Johano ; kaj kaŝlokoj, kie pluvivis adeptaj fratoj estis subkomprenigataj pere de simbolaj kreskaĵoj aŭ ŝtonoj, kiel indikiloj.

daŭrigota

S. BONIOL.

Aboni la revuon
estas ankaŭ helpi la kultur-domon

Tiuj femaloj troigas

Ĉiutempe Niaj Damoj, subkaŝe ridante, nomis nin « Siaj Sinjoroj kaj Mastroj ». Verdire ili tre ŝatus konduki nin al Sklaveco. Tamen, kiam oni ekzamenas tion, kio okazas ĉe la bestoj, ni devas konsideri nin paradizuloj. En kelkaj kazoj tiuj Damoj nur profitas la bonajn dispoziciojn de siaj edzoj, kiuj, kun ama koro, prenas sur sin taskojn propre patrinajn.

Ĉe la kat-fiŝo la femalo estas intrigantino vulgara kaj senskrupula ; ĉe la eloviĝo-tempo ŝi eligas siajn ovojn, rekte en la akvon, por ke la edzo ilin fekundu. Tuj ŝi foriras kaj la nova paĉjo ilin kaptas en sian buŝon, kie ili restos 2-3 semajnojn ; kun la dentoj kunpremitaj kaj la vangoj ŝvelitaj li tute ne povas manĝi ; eĉ li devas atenti sian gloton por ne gluti la tutan idaron.

Ĉe la ranoj paĉjo prizorgas la ovojn forlasitaj de la ino, gvatas ilian eloviĝon, transportas siajn ranidojn sur sia dorso aŭ alkroĉitaj al siaj kruroj aŭ al sia ventro. Alia preferas ilin gardi en sia voĉa sako transformita en kovilon ; laŭmezure kiam la idoj grandiĝas la sako ŝveliĝas kaj iĝas travidebla ; oni povas vidi iliajn metamorfozojn ; dume la svelta ino ĉasas la libelon inter la nimfeoj. Post dudeko da tagoj, forte starigita sur siaj kruroj, li fortege hikas por eligi la bebojn.

La hipokampo estas stranga kanelita fiŝo kun ĉevala kapo, kaj kiu stare naĝas ; kiam du geamantoj renkontiĝas, ili ŝajnas danci unu ĉirkaŭ la alia, laŭ graciaj zigzagoj ; pli ekzakte estas la belulino, kiu postkuras la knabon, kun preciza ideo en sia kapeto ; ŝi, pasante, tuŝetas lin kaj ĉiufoje, ŝtelume, glitigas en lian kanguru-poŝon, paketon da ovoj, kiujn la malfeliĉulo galantece fekundas. Finfine, li estas en interesa situacio kaj portas en sia abdomeno 200-300 ovojn. Iom post iom, la edzo montras elokventan ŝvelaĵon ; certe li estas graveda ; lia ventro pli kaj pli elstaras ; post 45 tagoj estas la akuŝofino : li elpelas etetajn hipokampojn, ĉiujn en unu fojo.

Kelkfoje, ĉe la Insektoj la femalo terurigas la masklon kaj eĉ antaŭvidas por li malbonan sorton ; tiucele, plejperverse, ŝi profitas la momenton, kiam la povrulo venas al ŝi kun la koro plena je delikataj sentimentoj, la momenton, kiu devus esti tiu de la dolĉaj allasoj.

Ĉe la araneoj, for la sentimentojn ! la femalo akceptas la masklon « kiel hundon en keglo-ludo » ; eble ŝi havas malbonan vidkapablon ! ĉiakaze, tuj kiam li metas la kruron sur ŝian araneaĵon ŝi konsideras lin kiel predaĵon kaj decidas lin enskribi en sia menuo ; ĉar ŝi estas multe pli dika ol li, la galantulo lernis kelkajn singardojn ; plejofte li kaptas muŝon, ĝin envolvas en sian silkon kaj ĝin alportas kiel edziĝan donacon. La ĉarmulino, ege scivolema, malpakas la pakaĵeton ; dume la masklo ŝtelume omaĝas al ŝi kaj forkuras. Tamen kelkfoje la masklo uzas fortan manieron : dank'al ĵudo-preno, li senmovigas ŝiajn venenajn hokojn : ja, por esprimiĝi, li ĝuas nur relativan komforton. Alia, kiel la antikva ret-armito, envolvas la objekton de sia flamo en silkan reton. Nenio estas pli malproksima de la reciproka ekstazo.

La malkvietiga manto montriĝas teruriga per sia brusto stara, la segilo-dentoj de siaj brakoj, sia kapo triangula, siaj okuloj globaj, sia spektra teniĝo ; ŝi estas la edzo-manĝegantino ; manturne ŝi anstataŭigas la alkovo-plezurojn per la tablo-plezuroj ; ŝian adoranton ŝi gustumas kiel palinuron ; li krakas sub ŝiaj mandibloj ; li rekte pasas de la sepa ĉielo al paradizo ; dum ŝi lin manĝegas li ankoraŭ movas sian abdomenon ; ne plu estas kapo, ne plu estas torako, lia ventro ankoraŭ moviĝas : ĝis restas nenio.

Kelkaj havas edzojn kiel oni havas pedikojn

Ĝis nun la edzo montriĝis individuo kompleta, aŭtonoma ; ĉe la maraj senvertebruloj la femaloj kreis masklojn nanajn, ekstreme nanajn ; ili estas nur besto-rudimentoj, konsistantaj el sia nura generanta funkcio kaj tute nekapablaj vivi per siaj propraj rimedoj. Tiuj super-abortuloj perdis preskaŭ ĉiujn organojn ; ilia eteta korpo estas nur sako plenplena je spermatozoj kun tre simpligita sperm-eljetaparato. Verdire ili estas nur naĝantaj spermatozoj, ofte instalitaj sur la femalo mem por ŝia plej granda oportuneco.

Ofte, interne de la paguro-konko, vivas la « Alcippe », longa je 6-8 mm. Longtempe oni pensis, ke ekzistas nur femaloj ; neniam oni vidis la masklojn ; tamen tiuj femaloj estas ĝenerale plenaj je ovoj, kio supozigas ekzisto de paĉjoj. La inoj, ŝajne, transportas kun si etetajn parazitojn, kiuj, senhonte, kampadas ĉirkaŭ ŝia genera aperturo ; la inoj ŝajnas tute ne ĝenataj ; verdire tiuj parazitoj estas la tre mikroskopaj

edzoj, reduktitaj al la plej esencaĵo ; oni ilin komparas al pistoloj celdirektitaj al la advekataj kondukiloj.

Pri etigado oni trovas rezulton ankoraŭ pli perfektan : « La Bonellie » estas dika globa vermo vivanta en certaj regionoj de Mediteraneo ; longa je 7-8 cm. ĝi posedas fork-forman rostron kapablan longiĝi ĝis 70 cm.-1 m. : ĝi estas la plej longa lango, kiun oni konas. La masklo ne superas 2 mm. ; por ilin vidi oni bezonas fortan lupeon ; ili loĝas en la intima interno de la edzinoj ; ili estas nur seksa glando, kiun ili veturas en la utero de la inoj. La rostro de la « bonellie » havas ĉefan rolon ; en tiu familio ĉiuj naskiĝas femalaj ; en ŝia infaneco ŝi estas nur eteta larvo, kiu naĝas tien kaj ĉi tien, serĉe al angulo por instaliĝi ; ŝi iĝos dika persono 8-centimetra. Sed la adoltaj femaloj viglas ; ili nepre bezonas masklojn kaj fortege tiras la langon ; pere de ĝi ili kaptas la naĝantan larveton, kiu tuj suferos duoblan eksterordinaran fenomenon ; unue ĝia kreskado interrompiĝas, ŝi restos 2 mm. longa kaj ŝia sekso ŝanĝiĝas ; de fraŭlino ŝi iĝas fraŭlo ; ŝi nesciis, ke la rostro de la adoltulinoj produktas kemiajn virigajn substancojn. Oni faris la eksperimenton en bokalo ; enen oni metis pecojn de rostro kaj larvetojn ; oni vidis la larvetojn resti etetaj kaj prepariĝi el enutera speleologio.

« La ophryotroque » estas anela malgranda vermo ; unurigarde oni vidas nur femalojn destinitajn al fraŭleco kaj sterileco. Tamen ili scias fabriki siajn proprajn edzojn. Severa longigita fasto havigas al ili masklajn glandojn ; la nombro de la aneloj estas determinata : pli ol 15 aneloj, estas virino, malpli ol 15 estas masklo. Femalo amsopiranta al sia najbarino tranĉas kelkajn el ŝiaj aneloj kaj jen ŝi havas edzon ! eĉ la femalo povas sin mem taŭge duonigi por ĉesigi sian fraŭlinecon.

La burĝonoj-edzoj

La rano-fiŝo estas ankoraŭ pli miriga. La femalo estas enorma persono, kiu promenas sian malbelan vizaĝon en la profundaĵoj de la



abismoj ; la tre malgrandaj maskloj ne vidas ŝin en tiu obskura mondo ; sed ili konscias apud si tiun tentan karnon ; ili mordas ĝin kaj jen ili estas kaptitaj por ĉiam ; iliaj buŝoj, iliaj naĝiloj, iliaj operkuloj malaperas ; ili ne plu moviĝas, ne plu manĝas, ne plu spiras ; iliaj angioj kuniĝas kun tiuj de la edzino, kiu, de tiam, ilin nutras ; ŝi spiras por ili. Ili perdis sian individuecon. Ili iĝis veraj greftaĵoj, eĉ burĝonoj, kiuj similas naturajn elkreskaĵojn de la femalo ; ilia nura celo estas produkti spermon, kies eliĝon ŝi kontrolas laŭ sia propra bezono.

Jen perfekta sklaveco al tiu nepra bezono de la Naturo : Reproduktado !

S. GUILLOT.

LA DILIĜENCO AL BEAUCAIRE (boker)

de Alphonse DAUDET

Estis la tago de mia alveno ĉi-tien. Mi eniris en la diliĝenco al Beaucaire, simpatia veturilaĉo grandaĝa, kiu ne bezonas multe ruliĝi por atingi sian alvenpunkton, sed kiu malrapidas survoje por opiniigi, vespere, ke ĝi venas de tre malproksime. Sur la imperialo, ni sidis kvarope, plus la veturigisto.

Unue, gardisto de Camarque (camarg), harkovrita, dikmalalta fele odoranta viro kun dikaj okuloj sangoplenaj kaj arĝentaj ringoj eĉ la oreloj ; poste, du Beaucairanoj, iu panisto kun sia knedisto ambaŭ ruĝvizaĝaj, tre spirmankaj, sed kun belegaj profiloj similaj al du romiaj medaloj kun la bildo de Vitellius. Fine, sur la antaŭa benko apud la kondukisto, iu viro, ne... iu kaskedo vastega el kunikla felo kiu preskaŭ silentis kaj malĝoje kontemplis la vojon.

Ĉi ĉiuj viroj sin konis reciproke kaj laŭte kaj libere diskutis pri siaj propraĵoj. La Camargano rakontis, ke li revenas de Nimes (nim) laŭ kunvoko de la enketa juĝisto pro forkofrapo kontraŭ paŝtisto. La camarga sango estas fajre vigla... kaj do en Beaucaire ! ...Ĉu niaj du Beaucairanoj ne volis buĉi unu la alian pro la Sankta Virgino ? Laŭdire, la panisto vivis sur paroko jam de longe konsekrita al la madono nomita « Bona Patrino » fare de la Provencanoj kaj portanta la infanon Jesuo sur siaj brakoj ; male, la knedisto kutimis kanti ĉe la korusa pupitro de tute nova preĝejo konsekrita al la Senpeka Koncipiĝo : bela bildo ridetanta montrata kun pendantaj brakoj kaj manoj de kie ŝprucas lumradioj. La kverelo naskiĝis tie. Estis vidinde kiel tiuj du piaj katolikoj reciprokis insultojn al si mem kaj al siaj madonoj.

— Belaĉa ja estas via koncipiĝo !

— Iru for kun via bona patrino !

— La via skandale kondutis en Palestino !

— Kaj la via, fi ! Malbelega ! Kion ŝi ne faris ?... Pri tio, demandu Sanktan Josefon !

Por imagi sin sur la haveno de Napolo, nur mankis la spektaklo de la brilantaj tranĉiloj kaj verdire mi kredas, ke tiu impona turniro teologia trovus tian konkludon, se la kondukisto ne intervenus.

Lasu nin trankvilaj, do, pri viaj madonaĵoj, li diris ridante al la du Beaucairanoj ; ĉi ĉio estas nur virinaj klaĉaĵoj, en kiujn la viroj devas ne enŝovi sian nazon.

Poste, li krakigis sian vipon iom skeptike kaj konkordo denove regis !

Finita la diskutado ; sed la panisto tiagrade incitiĝis ke li bezonis eluzi sian restantan verson kaj turnante sin al la nefeliĉa kaskedulo, silenta kaj malĝoja en sia angulo, li mokeme alparolis lin :

— Kaj via edzino, akrigisto, al kiu paroko ŝi aliĝis ?

Estas supozinde, ke en tiu demando troviĝis tre komika aludo ĉar ĉiuj okupantoj de la imperialo ekridegis. La akrigisto tute ne ridis. Li ŝajnigis surdecon. Vidante tion, la panisto turnis sin al mi :

— Vi ne konas lian edzinon, sinjoro ; stranga parokanino ; du similaj ne estas troveblaj en Beaucaire.

La ridado duobliĝis. La akrigisto ne moviĝis, sed nur mallaŭte diris, nelevante la vizaĝon :

— Silentu, panisto.

Sed tiu petolema panisto tute ne emis silenti kaj li daŭrigis ankoraŭ pli vigle kaj laŭte :

Fulmotondre ! Nia kunulo ne bezonas kompaton, ĉar li posedas tian edzinon. Neeble enui, eĉ unu minuton, kun ŝi. Imagu ! Iu belulino, kiun oni forrabas ĉiun duonjaron, havas multe por rakonti ĉe sia reveno. Vere stranga paro... Sciu. sinjoro ili ankoraŭ ne estis geedzoj de unu jaro. kiam la edzino forvojaĝis al Hispanio, kun vendisto de ĉokolado.

La edzo restas hejme, tute sola, li ploras kaj drinkas. ...Li estis preskaŭ freneza ; post kelke da tempo, la belulino revenis hejmen hispane vestita, kun tambureto garnita per tintiloj. Ni ĉiuj diris al ŝi :

— Kaŝu vin ! Li mortigos vin !

— Ha ! tute ne ! Mortigi ? Ili denove vivis kune, tute kviete kaj ŝi instruis al li ludi la vaskan tamburon.

Denove, ekridego. En sia angulo, sen rigardi alten, la akrigisto reflustris : « Silentu, panisto ! ».

Sed la panisto ne obeis kaj plu parolis.

— Eble, sinjoro, vi opinias, ke post sia reveno de Hispanio, la belulino iĝis pli saĝa. Tute ne ! Ŝia edzo tiel kompleze konsideris la hispanan aventuron ! instigis ŝin al pliaj malaperoj... Post la Hispano, venis oficiro, kaj boatisto de l'Rodano kaj muzikisto, kaj iu... Ĉu mi povas koni ilin ĉiujn ? La bona flanko de la afero estas, ke ĉiufoje, okazas la sama komedio. La edzino foriras. la edzo ploras ; la edzino revenas, la edzo konsoliĝas kaj senhalte ŝi forkuras, kaj senhalte li akceptas ŝin... Kiel pacienca edzo ! Oni devas aldoni, ke ŝi estas neimageble bela, la juna akrigistino... vera peco de kardinalo vigla, ĉarma, belkorpa, krome kun blanka haŭto kaj avelkoloraj okuloj, kiuj ĉiam ridas al la viroj. Nu, Parizano, se vi revojaĝos tra Beaucaire...

— Ho ! Silentu, panisto ! Mi petegas ! denove eksplodis la kompatinda edzo ne sen korŝira voĉo.

Je tiu momento, la diligenco haltis. Ni ĵus atingis la farmodomon de la Andores (andor). Tie elveturis la du Beaucairanoj kaj mi ĵuras al vi, mi ne provis plu restigi ilin. Ŝercema panisto ! Li iradis en la korto de la farmo kaj oni ankoraŭ aŭdis lian ridadon.

Post la malproksimiĝo de tiuj du viroj, la imperialo ŝajnis malplena. La Camarganon oni forlasis en Arles (arl) ; la veturigisto paŝis sur la vojo, apud la ĉevaloj, ; sur la veturilo, nur la akrigisto kaj mi, ĉiu sidis en sia angulo neparolante. Estis varme, la ledŝirmilo brulumis. Fojfoje, mi sentis, ke miaj okuloj fermiĝas kaj mia kapo iĝas peza ; sed neeble ekdormi. En miaj oreloj, daŭre sonis tiu « Silentu, panisto, mi petegas ! » tiel kortuŝa kaj milda. Ankaŭ li ne dormis la kompatinda viro. De malantaŭe, mi vidis liajn dikajn ŝultrojn tremeti kaj lian manon — longa mano blankaĉa kaj nebela — salteti sur la apogilo de la benko, kiel farus mano de maljunulo. Li ploradis.

— Jen, vi alvenis al via hejmloko, Parizano ! subite kriis al mi la kondukisto ; kaj per sia vipo il montris la verdan altaĵon sur kies pinto staras la ventmuelilo kiel dika papilio.

Mi rapide elveturiĝis... Pasante apud la akrigisto, mi provis rigardi sub la kaskedo, mi ŝatus vidi lin antaŭ mia foriro. Kvazaŭ li komprenis mian deziron, la kompatindulo abrupte levis sian kapon kun fiksa rigardo al mi :

— Atente rigardu min, amiko, li diris, kun malklara voĉo kaj se iam estonte, vi ekscios, ke malfeliĉo okazis en Beaucaire, vi povos diri, ke vi konas la kulpulon.

Lia vizaĝo estis senviva kaj senĝoja, kun etaj okuloj senkoloraj. En tiuj okuloj, larmoj, sed en tiu voĉo, malamo. Malamo signas la koleron de la malfortuloj !... Se mi estus edzino, mi timus !...

trad. A. Ribot.

KLARIGOJ PRI PROPRAJ NOMOJ

ARLES (arl) Provenca urbo, kie fluas la Rodano. Tre belaj kaj imponaj ruinoj romiaj estas vindindaj precipe la nekropolo mezepoka Les Aliscans (lezaliskan). (40.000 enloĝantoj).

BEAUCAIRE Alia provenca urbo, kie fluas la Rodano (12.000 enlogantoj).

CAMARGUE (kamarg) : Granda insulo (72.000 hektaroj) formita de la Granda Rodano (orienta) kaj la Malgranda Rodano (okcidenta) (Delto de l'Rodano). Grandskala bredado de ĉevaloj kaj virbovoj ; botanikaj kaj zoologiaj rezervoj.

DAUDET Alphonse (dode alfons) : Fama franca verkisto nask. en Nimes (1840-1897). Inter liaj verkoj, ni citu : Le petit Chose, Tartarin de Tarascon (jam esperantigita), Leteroj el mia muelejo el kiuj vi povos legi keikajn en KULTURAJ KAJEROJ.

RODANO franclingve : Rhône (ron). Tiu riverego naskiĝas en Svisio kaj post 1334 kilometroj de fluado finiĝas en la Maro Mediteraneo.

NIMES (nim) Ĉefurbo de la departemento Gard (gar) (92.0000 enloĝ). Unu el la plej belaj kaj vizitindaj urboj de Provence, tre riĉa je antikvaĵoj ; plurai mondfamaj romiaj monumentoj : la Maison Carrée (meson kare) romia templo, belege konservita, la Arenoj, la Templo de Aŭgusto, la Templo de Diane, la Turo Magne ktp.

VITELLIUS (sama prononco) romia imperiestro kiu vivis de 15 ĝis 69 post Kristo, reginte nur 8 monatojn.

La talento estas senlima

Eble la leganto memoras pri mia amiko, kiu decidis evoluigi nian ligvon. Antaŭ nelonge mi promenis en la Esperanto-parko — ĝi troviĝas en Budapeŝto —, kiam mi ekvidis lin profundiĝanta en s.aj pensoj. Subbrake li portis la PG-n, la PAG-n, la PV-n, keikajn revuojn, gazetojn. Surbruste vidiĝis orangkolora kvinpinta stelo kun surskribo : Esperanto Tutmonda Lingvo. Nome iu « lingvologo » post profunda esploro konstatis, ke nia lingvo tial ne evoluas pli rapide, ĉar la verda koloro neniun instigas al lingvolernado kaj tion Zamenhof ne sciis. Kompreneble mia amiko tuj aligis al la nova « Orangkolora Esperanto-Unuiĝo » — OEU, kiu tion disvastigas, ke la verda estas la koloro de la espero, sed la orangkolora estas tiu de la scio ! Mi alparolis lin :

— Kien tiel rapide, kara samideano ?

— Ĉu mi rapidas ? Mi pensis, ke mi promenadas —, li respondis.

— La vetero belas, tial troviĝas ĉie tie gepromenantoj —, mi diris.

— Jes, belveteras, sed kial vi diras, ke ĉi tie troviĝas du gepromenantoj ? Vi ne komprenas min, mi vidas. Nu, gepatroj estas patro kaj patrino. Logike : gepromenantoj estas promenanto kaj promenantino. Sed ĉi tie promenadas almenaŭ cent personoj.

— Jes, do « direndas », almenaŭ cent gepromentoj promenas.

— Ah ! Vi naivulo. Mi inventis la afikson « gej ». Vi tuj komprenos. Se en la lernejo la instruisto diras al la ĉeestantaj gepatroj ; karaj, estimataj gepatroj, ili ne scias, al kiu diras tion la instruisto, ĉar gepatroj estas unu patro kaj unu patrino, kiuj estas geedzoj. Sed, se li diras, karaj gejpatroj, tiam temas pri ĉiuj ĉeestantaj gepatroj. Ĉu klare ?

— Ne tute... jes, mi devas iome pensadi —, mi balbutis.

— Ankoraŭ alia ekzemplo. En la lernoĉambro sidas gelernantoj. Ĉu unu lernanto kaj unu lernantino ? Ha, ha, ha ! Tute ne ! Ĉiuj benkoj estas okupitaj de ili, do tie sidas gejlernantoj !

— Bedaŭrinde estas sciate, ke... —, mi ekvoĉis, sed li interrompis min.

— Sufiĉas diri : « sciates ». Mi vidas, ke vi denove ne komprenas min. « Tio estas sciata », do, tio sciatas, kaj « estas sciate », do logike, sciates. Nu, vidu, kiel simplas !

— Fantaste ! Kaj la Akademio, ĉu ĝi sciiĝis pri via... afiksa neologismo ?

— Ĝi estas « novologismo », ĉar mi el Esperantaj vortoj formas novan, logikan Esperantan vorton kaj ne el la angla ! Nia kara lingvo baldaŭ estos nomata : « angleranto » aŭ « esperanglo », se ni ne vekiĝas tuj, nun, ne morgaŭ ! Cetere, nun jam vi facile komprenas ; gepromenantas. Superfluas la persona pronomo, ili, ĉar « ge » signifas, ke temas pri du personoj. Kaj gejpromenantas ? Pensu !

— Jes, jes, mi pensados hejme, sed nun... —, mi diris, sed li ree interrompis min :

— Mi volas montri ion al vi. Tion nur al vi...

— ...kaj al Kulturaj Kajeroj, mi esperas, ĉu ne ? — mi daŭrigis.

— Kompreneble. Jen, mia « anticipgarda » poemo. Iam oni diris avangarda. « Se vi ofte kvankamas, /Nur malofte vi amas./ Se vi ĉuas tamen,/ Jen la fino, amen ».

Min kaptis kapturniĝo. Kompate mi alrigardis lin. Ĉu tamen ekzistas ia Esperanto-malsano, « esperantito » ?

— Vi ne komprenas ĉion. Nu, kvankami signifas heziti longe ion fari, ĉui estas demandi. Logike, ĉu ne ? Mi ĉuas vin kaj vi... ? Vi malĉuas al mi !

— Mi haste adiaŭis lin, mensogante, ke iu min atendas jam delonge, sed li postkriis ion al mi, kion mi jam ne aŭdis, ĉar mi kvazaŭ kure atingis la aŭtobushaltejon.

Stefano NAGY.

BENATA ESTU LA HOMA MEMOR'
KAJ LA NATURO, KIU VIVON FESTAS

En 1930 mi estis 20 jara fraŭlo ne malbela kaj estante radio-amatoro, esperantisto kaj sportulo, ne tre interesiĝis pri virinoj. Sed foje mi konatiĝis kun junulino en ies hejmo kaj mi estis ravita de ŝi. La tutan vesperon mi estis kun ŝi kaj kiam ŝi ekiris hejmen mi akompanis ŝin. Veninte al ŝia hejmo mi petis ŝin pri plua renkontiĝo. Kun ioma hezito ŝi konsentis kaj de tiu tempo ni ofte renkontiĝis. Kie ajn ni estis mi ĝuis ŝian inteligentecon kaj klerecon. Pasis du monatoj kaj mi petis ŝin edziniĝi al mi. Sed ŝi ekridetis kaj invitis min al sia hejmo, kie mi neniam estis kaj kien mi neniam estis invitita. Malgranda loĝejo, du ĉambroj bele meblitaj kaj ornamitaj kaj sentiĝis, ke ĉi tie loĝas homo bone komprenanta kaj amanta la arton. Ni eksidis vid'al vide. Ŝi silentis iom da tempo kaj ekparolis mallaŭte rekte rigardante miajn okulojn. « Mi vidas, ŝi diris, ke vi vere amas min, ĉar tion pruvas v'a konduto. Dum pli ol du monatoj vi eĉ ne unu malgentilan agon faris rilate al mi, nek penis min kisi, nek brakumi. Tial, responde al via propono, mi volas rakonti al vi mian vivon... Kara Peĉjo, mi estas 10 jarojn pli aĝa ol vi. Mi jam estis edziniĝinta kaj antaŭ 6 jaroj mi eksedziniĝis. Mi estas kuracistino. Vi pensis, ke mi estas junulino pro mia juneca aspekto, sed tion mi ŝuldas al miaj gepatroj kaj mia pasio al sporto. Dum du monatoj mi ne deziris rakonti ion ajn pri mi al vi, sed via propono devigas min al tio. Vi atendas mian respondon, ĉu ?... Vi ne taŭgas esti mia edzo. Mia edzo devas esti pli aĝa ol mi, solida viro, ne tia knabo, kia vi estas, kvankam mi volus, ke mia estonta edzo havu por mi tiom da amo, kiom vi havas. Mi ne scias ĉu mi amas vin sed estas por mi ege agrable esti kun vi, paroli kun vi ; al mi plaĉas niaj ekskursoj, la naĝado en Dnepro, via kapablo min aŭskulti. Do, ne koleru pri mi, ke mi ne donis al vi jesan respondon. Mi neniam estos via edzino. Eble iam vi povos esti mia amanto sed ne nun. Iru kaj ne plu venu ĝis mi skribos al vi.

Post la paso de unu semajno, kiun mi travivis en « nigra angoro » mi ricevis leteron de ŝi, kie estis nur kelke da vortoj, sed kiaj vortoj ! « Peĉjo, sabate vespere mi estos libera kaj atendos vin ». Du longajn diurnojn mi atendis tiun sabatan vesperon kaj kiam mi venis mi povis diri eĉ ne unu vorton. De tiu vespero komenciĝis por mi tiuj feliĉaj 20 monatoj, kiujn mi neniam povis forgesi. Ni ekskursis, ni vizitis teatrojn, kinejojn, muzeojn, koncertojn, artajn ekspoziciojn. Ni partoprenis renkontiĝojn kun elstaraj verkistoj, poetoj, pentristoj, muzikistoj. Kievo estis kaj estas grava kultura centro de Ukrainio. Se mi estas tia, kia mi estas nun, mi tion devas danki al mia amatino. Ŝi instruis al mi esti vera homo, ami homojn, estimi virinojn, neniam hipokriti kaj esti honesta en miaj intencoj. Ŝin mi devas danki, ke ŝi inokulis al mi la amon de literaturo, poezio, arto, muziko. La minutojn de seksa proksimeco sekvis horoj de amikaj konversacioj kaj en la rolo de instruanto estis mia karulino. Mi estis plene sub ŝia influo. Mi amegis ŝin. Mi ne scias ĉu ŝi amis min, sed ŝi estis sincera en siaj rilatoj kun mi. Al ŝi certe plaĉis mia juneco, mia senrezerva amo, mia deziro posedi ŝin, aŭskulti ŝin dum horoj. Certe ŝi, jam delonga solulino, nehavinta infanojn, havis la bezonon virinan zorgi pri iu, do, tute naturan bezonon de virino havi amantan viron. Por mi ŝi estis amatino, fratino kaj patrino. Mi bone memoras la lastan tagon de mia feliĉo, kiam mia amatino, brakuminte min, diris, ke la tago estas la lasta de nia kunvivo, ke ŝi devas edziniĝi al 45 jara solida inĝeniero, ke ŝi devas ĉesigi sian senbridan vivon kaj havi edzon. Mi neniam forgesos tiun tagnokton. Dum tiu tagnokto ni rememoris la tuton, kion ni travivis dum tiuj 20 monatoj kaj ploris. Jes mi ne hontas tion diri. Kaj kiam jam estis la tempo disiĝi, ŝi brakumis min kaj kisante krietis : « Pardonu min Peĉjo, ke mi, amante vin, decidis disiĝi. Mi ne volas la disiĝon sed mi devas edziniĝi. Mi deziras trankvilan vivon al kiu aspiras ĉiu virino, despli tiu, kiu jam estas 32 jara ». Ŝi parolis kaj ploris kaj kiam post mi fermiĝis la pordo, mi aŭdis ŝian ploradon. Mi staris ĉe la pordo kaj pensis pri tio, kiel malfeliĉa mi estas.

Mi ne plu vidis ŝin iam ajn. Nur en la jaro 1946, kiam mi kaj mia edzino venis Kievon vizite al niaj gepatroj, mi eksciis, ke ŝi pereis en la batalo kontraŭ hitleranoj. Ŝi estis kuracistino en granda partizana taĉmento. Eksciinte, mi ŝin priploris kaj mia edzino, mirigita, demandis pri la kialo kaj nur tiam mi rakontis al ŝi pri mia unua amo. Ankaŭ la edzino ploris.

Petro POLIŠČUK.

Ni devas informi niajn legantojn ke Petro Poliŝĉuk, kiu verkis por ni multajn artikolojn, mortis en oktobro. Ni bedaŭras ke amiko foriras, kaj ke ni ne plu legos liajn simplajn sed ĉiam kortuŝajn rakontojn.

POR VIA DISTRO


SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO :

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
L	A	V	I	R	O	E	N	L	A
A	R	I	M	O	T	N	A	A	N
A	K	T	I	M	I	U	S	N	O
M	O	R	T	O	T	U	K	O	■

La trovota titolo estis : LA VIRO EN LA MORTOTUKO.

NOVA PROBLEMO :

Krucvortoj (proponitaj de R. Raynaud).



(R) = nur radiko

Horizontale :

1) — Senigi iun je fidindeco.
2) — Ĝuanta ekvilibran karakteron — Inverse, nombro.
3) — Unuafoje faritaj — Forigi haladzo.
4) — Senekstera instigo (R) — Eksceso.
5) — Du vokaloj en vokaloj — Flavmalsano.
6) — Ideografiaĵa.
7) — Fantazie elpensita — Ofendintence pika (R).
8) — Nedefinita pronomo — Prepozicio — Klaĉo (R).
9) — Sukulenta planto kun longaj dikaj sukplenaj bazaj folioj kaj tubformaj floroj (R) — Sen eĉ vinfolio (R) — Interjekcio por alvoki telefonkorespondanton.
10) — Estas pli bone havi du ŝnurojn al la sia. — Participa adverba finaĵo — Tia estas urtiko (R).
11) — Ĝi streĉas ŝtrumpon (R) — Ludona.
12) — Tia estas olivo — Por kunigi du metaltavolojn (R).

Vertikale :

1) — Ĉio, kion oni surmetas por kvietigi la soifon de gasto aŭ kliento.
2) — Tre ĝena trudherbo ĉe domo — Vadbirdo (R).
3) — Parto de preĝejo — Prefikso — Malnova unuo de termezurado (R).
4) — En Irlando, grupo da familioj kun komuna prapatro (R) — Amerika mamulo el la subordo de rabobestoj.
5) — Permesilo — Inversita prepozicio.
6) — Prepozicio — Bona tranĉilo devas esti tia — El oro, ĝi taŭgas por ĉiu laboro.
7) — Rilata al du kaj plurjaraj herboj kun ofte brilkoloraj petaloj — Participa finaĵo.
8) — Inverse inklini — Nomo de belbrusta filmheroino.
9) — Ĝi devenas de la feĉo kiu formiĝas en vino (R).
10) — Formortinta bovo — Inversita prepozicio — Ĉiam verda arbo (R).
11) — Sur la dorsa flanko de poŝtmarko — Froti ŝuojn per ciro.
12) — Imbecilo (R) — Desegno teksita sur ŝtofo (R).

GRAMATIKO PER BONHUMORO

◆◆◆◆

Akordo de la ADJEKTIVOJ

DIVERSAJ ADJEKTIVOJ :


— **kvalifikaj** (bela, nokta) montraj (tiu, tia) **demandaj** (kiu, kia) **kolektivaj** (ĉiu, ĉia) **nedifinaj** (iu ia) **negativaj** (neniu, nenia) **numeralaj** (dua, kvina).

ĈIUJ AKORDIĜAS KUN LA SUBSTANTIVO :

— **nombre** (singularo, pluralo).

— **kaze** (kun akuzativo aŭ ne, laŭ la gramatika funkcio) mi serĉas nenian libron ne diru tiajn parolojn — jen la domo, vidu ĝian pordon — iun tagon, mi diros al vi ĉiujn sekretojn — kiun pentraĵon vi volas ?

Genio :



— Vere tiu konstruo estas tute eksterordinara !

— Certe. Sed, ja, la laborestro fidele sekvis la planon de la arkitekto. Verdire, tiu plano estis tute ĉifonita. La laborestro pensis, ke estis frukto de genia inspiro.

Scio kaj nescio :



Kio okazas al vi, Sinjoro optikisto. Ja, ja, estas mi, kiu kulpas.

Mi forgesis konfesi al vi, ke mi estas tute analfabeta.

Kia epoko !



ĉu vi povas imagi, ke eĉ la ostojn ili enfermas en siajn monkofrojn !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichs trasse, 2, LINZ (170 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (330 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregards vej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (65 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivis töntie, 05510 Hyvinkää 51 (44 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KAS SEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10° - D ALICANTE - (850 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.k. 14321285 (10 600 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoons traat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (22 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Maridalsveien 128 A OSLO 4.

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSO VIO (12 us. dol.).

Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (45 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (22 fr.).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Weno nah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj lan doj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 1 de 1982, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

L'avant-dernier « Entre Nous » m'a valu une correspondance intéressante faisant part de la prise de conscience par certains amis d'une réalité désagréable. Mais je tiens à répéter que les « bavures » relatées ne sont le fait que de quelques-uns. Il est bien difficile d'exiger de tous ceux qui participent à la vie du monde espérantiste de se soucier d'abord de la cause de l'Esperanto. Il est tellement plus facile de demander que d'offrir. Cela se vérifie chaque jour et dans tous les domaines.

Par contre, aucune réponse n'a été faite à l'appel lancé dans le dernier numéro pour que quelques amis se joignent aux équipes assurant la gestion des stages. Le renouvellement de ces équipes, ou plus exactement l'accroissement de leur nombre est nécessaire. Certaines risquent de s'essouffler. Espérons encore que la source des bonnes volontés n'est pas tarie. Il serait désolant de voir Grésillon décliner un jour, alors que s'affirme davantage chaque année son succès, par manque de responsables. Il est difficile peut-être de trouver dans un couple deux bonnes volontés (les compétences s'acquièrent), l'une s'exerçant sur la responsabilité administrative, l'autre sur l'intendance. C'est pourquoi nous accueillerons avec plaisir également les collaborateurs éventuels qui sont prêts à participer individuellement à la conduite de la M.C.E. pendant l'été. Nous relançons donc notre appel pour que, l'été prochain, des amis acceptent de venir s'initier à la gestion des stages.

Le nombre de demandes de renseignements pour les périodes de printemps et d'été est pour l'instant prometteur. Des inscriptions fermes sont déjà parvenues fin novembre. Le nouveau découpage en quatre périodes déconcerte quelques habitués, mais semble convenir à d'autres. Les nouveaux tarifs n'ont pas attiré de commentaires particuliers. Il s'est avéré d'ailleurs, si nous comparons nos prix avec une valeur fixe, la Stelo en l'occurence, que nous avons simplement retrouvé le niveau des prix de 1977.

Cette année encore, il sera nécessaire de s'inscrire tôt. N'attendez pas pour demander notre programme d'activités.

P. BABIN.

INTER NI

La antaŭlasta « Inter Ni » ricevis grandan ecion kaj ni ricevis interesajn leterojn. Sed estas necese insiste diri, ke la malagrablaj realaĵoj pri kiuj mi skribis koncernas nur kelkajn personojn. Ne ĉiuj vizitantoj precipe pensas pri la estonteco de Esperanto aŭ pri la « grezijonaj » problemoj. Multe pli facile estas peti ol oferti. Tion ni ĉiutage konstatas kaj ne nur en la esperantista rondo kompreneble.

La nombro da informpetoj ĝis nun ricevitaj estas promesplena. Jam de novembro alvenis aliĝoj. Ŝajnas, ke la nova dispartigo de la somertempo en kvar periodoj anstataŭ tri surprizis kelkajn malnovajn amikojn sed tute ne konfuzas la pli multon. Ni ricevis neniun rimarkon pri la novaj tarifoj. Fakte pruviĝis, per komparo kun fiksa monvaloro, tiukaze kun la stelo, ke la prezoj retrovis nun sian nivelon de 1977.

Ni atendas vin venontan someron. Verŝajne tiom pluvas kaj neĝas nun, ke restos eĉ ne unu pluvero por Julio kaj Aŭgusto. Do, venu plenfide, sed ne forgesu tuj aliĝi. Almenaŭ ne tro atendu.

NOS JOIES

Bertrand Rousseau est né le 2 décembre. Du même coup, Pierre et Françoise ont hérité d'un fils, Jack et madame d'un petit-fils et Perrine d'un petit frère. Compliments à tous.

Franziska Babin-Witters a donné le jour à Julia, le 23 décembre, à la grande joie du papa Nicolas, des grands-parents, des oncles et tantes et de son cousin Pierre, son aîné de trois mois. Tous nos vœux.

LA REVUE

Un appel à réabonnement a été porté sur la bande du dernier numéro pour les abonnés retardataires. S'ils ne renouvellent pas rapidement cet abonnement, ce numéro est le dernier qu'ils reçoivent.

S'abonner
à Kulturaj Kajeroj
c'est aussi aider
La Maison Culturelle

ESPERANTO - DOMO

Grésillon, 49150 BAUGE (FRANCIO)

Telefono :

— dum la aranĝoj : (41) 89 10 34

— ekster la aranĝoj prefere skribu

KULTURAJ ARANĜOJ 1982

PRINTEMPO

Alveno Dimanĉon 4-an de Aprilo posttagmeze — Foriro Dimanĉon 11-an de Aprilo matene

— Internacia renkonto de infanoj

— Diskutrondoj pri lingvo-instruado

SOMERO

UNUA PERIODO

Alveno Dimanĉon 27-an de Junio — Foriro Sabaton 10-an de Julio

PRELEGOJ diverstemaj

— Diskutoj pri la prelegoj

— Studado de la lingvo

— Malkovro de la regiono

DUA PERIODO

Alveno Dimanĉon 11-an de Julio — Foriro Sabaton 31-an de Julio

KURSOJ por komencantoj kaj progresantoj

— Studado de la lingvo

— Manlaborado

— Malkovro de la regiono

TRIA PERIODO

Alveno Dimanĉon 1-an de Aŭgusto — Foriro Sabaton 14-an de Aŭgusto

STUDADO KAJ PRAKTIKADO de la lingvo

— **Prelegoj** kaj konversacioj

— Manlaborado

— Malkovro de la regiono

KVARA PERIODO

Alveno Dimanĉon 15-an de Aŭgusto — Foriro Sabaton 28-an de Aŭgusto

ARMETIOJ (fotoarto, korbofarado, librobindado,...)

— Praktika uzado de la lingvo

— Kurso por komencantoj

— Malkovro de la regiono

N. B. : Sesioj de ekzamenoj estos organizitaj kvankam la celo de la kurso ne estas precize la preparado de tiuj ekzamenoj.

LIBRO--SERVO

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

Adressez vos commandes à :

Janine VINCENT
B.P. 54
49150 BAUGE

Intitulé pour les chèques :
Maison Culturelle Esperantiste
C.C.P. : 1 485 39 P NANTES

Port gratuit pour commande au-dessus de 100 F.

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 50,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

Vient de paraître



Livre de lecture et d'étude pour enfants